Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AUSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 23-1-80

6-a jaro OKTOBRO/DECEMBRO 1951 n-ro 10/12

P L I D A L U M O !

Pri la paroladо de d-ro Edmond Privat dum la XXXVIa Universala Esperanto-Kongreso.

Kiu konvenas pli en la nuna momento ol d-ro Privat por paroli al ni pri tio, kio estis, estas kaj eble est= os, li, la apostolo de la pensoj de la Majstro? libere parolante sen notoj, maljuniginta Privat ne perdis sian talenton de unuaranga oratoro, sian facilecon, krei kom= parojn komprenatajn tuj, sian agreblan voĉon. Li reven= igas la belan epokon de la unua kongreso en Bulonjo, 1905, elvokas la memoron de Hodĝer, la animon de UEA. Lia voĉo altiĝas, kiam li reliefigas la sintenon de d-ro Zamenhof, rifuzanta energie akcepti materian percepton pri Esper= anto. Por d-ro Zamenhof la lingvo ne estas ilo por faci= ligi la materiajn interesojn de la homoj, sed antaŭ ĉio ia rimedo por pli bona kompreno, por krei tiun ĉi atmo= sferon de konkordo, necesa por pacon certigi.

Kaj nun ekstaris antaŭ ni aŭdantoj la vivo de pro= feto: kortuŝe Privat skizis la vivon, per simplaj vortoj de tiu ĉi viro, al kiu la mondo dankas Esperanton. Kres= kis ja emocio kiam li rakontis pri sia lasta vizito al d-ro Zamenhof en jarc 1916, nelonge antaŭ lia morto.

Le unua milito forte skuis nian movadon. La dua, antaŭata de la malpermeso de Esperanto en Germanlando, ĝenĝis la mondon, sed ne detruis nian aferon. Ni devas nun rekonstrui, spite la minacon de tria milito kun ĉiuj perspektivoj de ĝisfunda detruo. Eĉ se ĉio detruiĝus, restus tamen iuj kaj inter ili estus esperantistoj, kiuj

ne estus forgesintaj nian aferon sanktan. D-ro Privat aludas la antaŭparoloN en la kongreslibro, verkitan de Konrad Deubler, kaj li citas la belan admonon: "Kiom da germanoj pro tiu ĉi sperto (de fremda okupacio) memoris je la sorto de la homoj en la landoj, en kiuj antaŭe estis germana okupado kaj militaj bataloj? Kaj kiom da ili pensis peti pardonon de ili? Ĉio nur zenkulpaj kulpuloj kaj la persekutitoj de la propra lando." La oratoro dankas al al verkinto pro tiu ĉi bela signo de kompreno pri la vera situacio, reganta inter Germanlando kaj la estintaj "malamikoj", kaj li aludas pri la detruoj de Munkeno kaj de Londono, kiujn li vidis, kaj kiuj nur pruvas la malsaĝecon homan.

Kiel Esperanto povos venki la barojn? Ni ne atendu miraklon, car tiaj estas nur unufoje, ekzemple la kreo de Esperanto. Gia enkonduko estos frukto de nia laboro, de nia daŭra penado. Tiom longe, kiom la suvereneco de la ŝtatoj malebligas ĉian interkonsenton pri io tusenta ĉiujn homojn, ĉia kultura penado baraktas kontraŭ tiu ĉi anomalio. Nur en la momento kiam tutmonda federalismo forigos la daŭran timon kaj kiam tutmonda parlamento decidos pri tuthomaraj problemoj, nur tiam ni rajtos atendi ion konkretan. Same kiel ni Esperantistoj ne intencas forigi la naciajn lingvojn, tiel la federalisma tutmondo ne detruos la ŝtatojn. Ne detrui la diversecon, sed unuecon en la diverseco ni volas.

La oratoro citas la problemojn, kiuj devas esti solvataj. Inter ili estas unu, ne tiom rimarkita de la pensantaj homoj, nome tiu de la instruado historia. Ĉiu popolo ja prezentas la historion laŭ propra percepto, jen blanka, ni mem, jen nigra, la malamiko. Necesas krei lernolibrojn de historio de tutmonda vidpunkto, ni dirus, de vidpunkto homara. La honorigon de herooj militaj devas kompletigi, ja eĉ anstataŭi la diskonigo pri la faroj de la "herooj de l' paco". Lernante pri la vivo de Julio Cezaro aŭ de Napoleono, ni memoru, ke ekzistas ankaŭ aliaj herooj, kiaj estis Francisko d'Assisi aŭ hinda reĝo Azoka.

Kiel trian postulon Privat aldonas la problemon pri rasoj kaj religioj, la respekto de unu al la alia. Li memorigas la gravan traktaton, kiun d-ro Zamenhof siatem-

pe sendis al la Rasa Kongreso en Londono, kies konkludo estis: Ne gravas la koloro, sed la nobleco de l' koro.

Ja ne estas longa dsitanco inter ni kaj la tempo kiam katolikoj kaj protestanĵoj batalis inter si. Neniu plu pensas hodiaŭ pri miltio inter katolikoj kaj protestantoj kaj la oratoro citas kiel ekzemplon de toleremo preĝejon en svisa urbo, en kiu oficas alterne katolika kaj protestanta pastroj. Pasis cent jaroj nun, de kiam Svislando havis militon pro religia kaŭzo. En proksima estonto rasa toleremo komletigos la religian.

Kaj la kvara postulo tuŝas la senton. La nacia patriotismo en la nuna tempo jam estas antagonismo. Ĝin iam anstataŭos la sento, ke ni ĉiuj estas fratoj kaj anoj de la sama homaro.

Fingro montrante je la muroj freskon de forĝisto, d-ro Krivat diras: "Vi vidas forĝiston, kiu forĝas armilojn. Venos la tempo, forĝi spiritojn kaj Esperanto laboras por tiu ĉi celo. Ni estu portantoj de lumo, de nova spirito. 'Pli da lumo' diris Gethe, minuton antaŭ sia morto. Laŭ la lumo sin diraktas la marvojaĝanto kaj eta lumo sur la monto faciligas al la montarano, trovi la ĝustan vojon. Ni Esperantistoj havas la verdan lumon, kiu en fiziko ludas tiom gravan rolon. Verda lumo en la moderna trafiko diras : pasu! Same por ni: Vojo libera per la verda lumo. Vivu la verda lumo, vivu la vero!

(Georges Agricola en "ESPERANTO" IX/1951)

Dr. L. L. Zamenhof:

Jede neue Idee musz lange und mit Schwierigkeiten kämpfen ... wir, die wahren Freunde der Weltsprache, wissen dies sehr gut und wir arbeiten geduldig, geduldig und nochmals geduldig und weder die fürchterliche Taubheit, die um uns herrscht, noch die entmutigenden und unsere Hoffnung vermindernden Schläge des Schicksals, welche wir bei jedem Schritt begegnen, werden uns von unserem Wege abbringen. Gewappnet mit dieser eisernen Geduld und mit dem Bewusztsein der Wahrhaftigkeit unserer Idee schreiten wir vorwärts trotz der Hindernisse, welche jeden unserer Schritte wehren, und wir zweifeln nicht, daran, dasz wir früher oder später siegen werden.

KOMUNIKOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

Ŝtataj Esperanto-ekzamenoj en Vieno okazos en decembro. Intersitoj petu pri informoj ĉe la E-Centro(nepre kunsendu respondafrankon).

AEF-kotizo. La estraroj de la AEF-grupoj estas petataj, informi siajn anojn pri la nova kotizo e k d e j u l i o ŝil. 1.50 po monato kaj zorgi pri plej baldaŭa enkasigo kaj transsendo de la alpago kun la eventualaj kotizrestaĵoj.

Esperanto-kursoj. La societoj nepre aranĝu kursojn kaj studrondojn por komencantoj. Ni volonte diskonigos ilin en nia revuo. Indiku la nombron de la partpprenantoj kaj la nomon de la gvidanto.

Viena Esperanto-Delegitaro komencis la 5an de sept. sian novan agadsezonon. La estraro (estro E. Vokal, afergvidanto R. Cech, sekretario O. Sinner, kasistino M. Loibel)petas pri alsendo de adresoj de neorganizitaj Vienaj gesamideanoj.

Aŭstria Esperanto-Instituto komencis la 10an de oktobro sian novan agperiodon. La kunsidoj okazos ĉiun duan merkredon de la monato je la 17.30 h en la E-Centro. Lingvospertaj kaj literaturemaj ges-anoj, ankaŭ eksteraj Vienaj, estas invitataj pri kunlaboro.

Aŭstria Esperanto-Konferenco 1952. Laŭ propono de la aŭstriaj ges-anoj, kiuj ĉeestis la ĉijaran AEF-jarkunvenon en Innsbruck, dum 1952 ne estos aranĝata AEKongreso, sed nur Aŭstria E-Konferenco. S-ano AEF-landestro de Salzburg, dir. Franz Fötinger, informis la E-Centron, ke la salzburgaj gesamikoj invitas la aŭstrian E-istaron, okazigi ĝin en sia urbo je la pentekostaj tagoj, la 1an kaj 2an de junio 1952. La estraro de AEF dankas al la invitintoj kaj komunikos datalaĵojn en la sekvantaj n-roj de nia revuo.

Esperanto en aŭstriaj gazetoj. "WIR UND DIE WELT", Vieno (3.Jg.,1) "Esperanto", 84 lin.; "ARBEITERZEITUNG", Vieno (4.8.), "Weltkongresz der Esperantisten", 10 lin.; "WIENER KIRCHENBLATT" (23.7.), "Katholischer E-Kongresz in München" (Mudrak); "VOLKSZEITUNG", Innsbruck (30.7.), Gegenseitiges Verstehen, ein wesentlicher Bestandteil des Friedens, 44 lin.; "KLERUSBLATT", Salzburg (III/51), Be-

richt über den internationalen katholischen E-Kongress in Rom, 15 lin.; "OESTERREICHISCHE FRIEDENSZEITUNG", Vieno (V/51), Schliesst die Reihen (d-ro Halbedl), 78 lin.

La AEF-estraro esprimas la dankon al la verkintoj de tiuj artikoloj.

Kunlaboremuloj por la E-Centro bv. anonci sin per telefono U 23-1-80 kaj persone.

Aŭstriaj reprezentantoj de internaciaj E-asocioj.

UNIVERSALA E-ASOCIO: magistro F. Höfert, Vieno XIV., Penzingerstr. 102; INTERNACIA KATOLIKA E-UNUIĜO: W. Mudrak Vieno III., Beatrixg. 19/9; SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA: d-ro A. Karner, Stams, Tirolo, UNIVERSALA LIGO: Hans Steiner, Wörgl, Aug. 42, Tirolo; SCIENCA E-ASOCIO: prof d-ro H. Sirk, Vieno III., Baumg. 26; SKOLTA LIGO ESPERANTISTA: d-ro A. Halbedl, Knittelfeld, Schmittg. 15, Stirio.

AUSTRIA ESPERANTO-KRONIKO

VIENO: Urbestro de Vieno, s-ano Franz J o n a s, akceptis la 3an de septembro la reprezentantojn de la Viena Esperantistaro, la s-anojn dir. Paul Glückmann kaj la afergvidanton de AEF, Rajmund Cech, kiuj transdonis al la s-ano urbestro la gratulesprimojn de la Viena Esperantistaro. Dum 40minuta vizito la urbestro informis sin pri la stato de la E - movado loka, aŭstria kaj internacia. Li montris sian intereson por nia afero kaj promesis, ke li laŭpove subtenos nian agadon, kaj li a l v o k i s l a g e s a m i d e a n o j n a l p l u a, p l i e n e r g i a k a j c e l k o n s c i a a k t i v a e c o, speciale sur la kampo de l'aplikado de nia lingvo. La s-ano urbestro sendas al la samideanaro siajn salutojn kiel aktiva esperantisto kaj ĉiama amiko de Esperanto, kiun li konsideras kiel veran interkomprenilon de la laborantaj kaj kreantaj homoj.

NEKROLOGO: En Vieno mortis dum junio nj. nia fervora s-ano Johanna W i h a r t (anino de la grupo HARMONIO). Al ŝia funebranta edzo ni direktas niajn profunde sentotajn kondolencesprimojn.

S-ano Erwin G. B e r n f e l d, Novzelando, loĝinta en Vieno, longjara sekretario de la E-Organizo de la

Oficĥavantoj kaj kolkjara UEA-ĉefdelegito por Aŭstrio, depost 1938 elmigrinta al Aŭstralio, sendis al DANUBIO detalan traktaĵon pri sia nova hejmlando kun salutoj al la Viena s-anaro. La tre interesa artikolo bone taŭgas por lastlego en niaj grupkunvenoj kaj estas tiucele je dispono.

40 jaroj DANUBIO. La Viena E-societo Danubio festos dum novembro la 40an datrevenon de sia fondo. Ĝi estis fondata la 11an de novembro 1911 kiel la tria, tiama Viena E-societo, post la "Unua Viena E-Unuiĝo" kaj la "Fideleco". Ĝiaj anoj en ĉiuj agperiodoj estis aktivuloj de la Viena E-movado. De la fondintoj nur plu vivas la s-anoj Rudolf Kaftan, direktoro de la Viena horloĝmuzeo, kaj Oskar Popper, komercisto, nuntempe loĝanta en Milwaukee-Usono. Refondite en julio 1945, ĝi denove arigis 45 fervorulojn, kiuj konservas al la societo ĝian bonan reputacion. Kun bedaŭro ni memoras tiujn ges-anojn, kiujn la kruela sorto en la jaro 1938 forpelis eksterlanden: Forlasis Aŭstrion tiam d-ro Emil Pfeffer kaj edzino al Urugvajo, Alfred Klein al Montevideo, ges-anoj Nebenzahl-Nell al Rochester-USA, inĝ. Bernfeld al Wellington, Novzelando. Kun sincera funebro ni klinas nin antaŭ niaj anoj, viktimoj de tiu tempo: la ges-anoj Marta Kohn, Irma Ullmann, Miniska Mantel, Max Ultmann kaj Ernst Sonnenfeld. Fine ni volas danke memori niajn elmendiĝintajn membrojn, fame konatajn s-anojn kiel prof. Simon, lernejdirektoro Schamanek, prokuristo Schade, d-ro Sös kaj Andreo Deistler. Je dankoplena memoro al la supre nomitaj ges-anoj la nunaj anoj de la jubileanta Danubio promesas, kune kun ĉiuj aktivuloj de la ceteraj aŭstriaj E-societoj daŭrigi siajn klopodojn por progresigi kaj venkigi la perfektan verkon de la geniulo d-ro Zamenhof. Rajmund Cech.

La grupo HARMONIO la 29.6. gastigis d-ron Tadros M e g a l l i , kiu dum ĉeesto de multaj ges-anoj el tuta Vieno rakontis en sia lerta maniero pri sia hejmlando kaj siaj travivaĵoj. - La 31.8. en la grupo gastis la franca s-ano, prof. L a b i t , Bulonjo sur Maro. Li paroladis pri la franca E-movado kaj siaj vojaĝspertoj en Svisio, Italio kaj Aŭstrio.

E-klubo j KALOCSAY-LABORO denove kunvenas en Volkshochschule Währing, Schopenhauerstr. 49, ĵaŭde, 19-21 h.

Ili invitas ĉiujn geklubanojn kaj amikojn el Vieno al denova partopreno al la variaj klubvesperoj kaj komunikas, ke kurso elementa estas gvidata de s-ano H.Kraus inter 18a kaj 19a. La kurson ĝis nun partoprenas nur du fervoraj lernantinoj, sed s-ano Kraus tamen ilin instruas. Ekpartopreno por interesitoj ankoraŭ estas ebla. Kotizo por 2 semestroj nur S 10 (fakgrupaneco).

SUPRA AUSTRIO: NEKROLOGO. Grandan perdon suferis nia movado en Supra Aŭstrio. Nia kara pionirino Trude K a l u g in- G o t h m a n n mortis la 16.8.51en Linz. Ĉiam helpopreta kaj oferema por nia granda celo, ŝi staris en nia mezo, tenante alten nian flagon kiel Hilde Diller. Same kiel Hilde Diller ni ŝin neniam forgesos.

Brünne Lachmayr-Fohler.

STIRIO: Knittelfeld. La nedevigan, sed laŭinstruplanan instruadon de Esperanto en la ĉeflernejo por knaboj, kiun laŭ propono de la direktoro salajru la ŝtato, pertoprenas ekde la 25.9. 59 knaboj.Necesiĝis 2 klasoj. Instruas d-ro H a l b e d l .

El la agadraporto de la landestraro por la periodo inter la lastaj AE-Kongresoj ni ekscias pri la morto de s-ano fervojinspektoro e.p. Franz S a n t l e r , al kies honora memoro estas dediĉita nekrologo. Radioparoladoj okazis jenaj: prof. d-ro A. Hainschegg pri "Vermittlungssprache für jedermann" (sendilo Graz), J. Eder pri "Die Losung der Weltsprachenfrage" (sendilo Alpenland) kaj d-ro A. Halbedl "Dem Gedenken eines Groszen"(sendilo Alpenland). Laŭ la raporto de la E-movado en Stirio nemulte progresis, kio estas atribuata al la indiferenteco,inerteco, sport-,lud- kaj dancemo de la publiko kaj aliflanke al la malinklino de multaj malnovaj E-istoj, membrigi al kluboj, kaj parte ties nefidemo pri la realigo de nia idealo. "Tamen ni daŭrigas nian laboron, por prepari la homaron pri la pli-malpli baldaŭa enkonduko de E. en la lernejojn kiel devigan instruobjekton." diras la raportantoj. Pri la superpertia agado en la stiria E-movado oni raportas favore. En la societoj kiel ankaŭ en la landestraro estas reprezentantoj de ĉiuj partioj,religioj, prfesioj kaj la membroj bonege kunlaboras, respekt=

ante alipensantojn. Tiel Esperanto formas 1 a komunan f u n d a m e n t o n por la diferencaj ideoj kaj opi=nioj.

TIROLO: La INFORMLETERO de AEF-landestro Hans Steiner, Wörgl, Augasse 42, en sia n-ro 7-9/51 enhavas detalegan raporton pri la Innsbruck-a AEKongreso. Inter=esitoj bv. ĝin mendi.

NEKROLOGO: En junio mortis s-ano lernejdirektoro Albert M a i r , kunfondinto de la Innsbruck-a E-socie=to, tradukinto kaj eldoninto de pluraj E-libroj (Vienaj Legendoj k.a.). Al liaj gefiloj ni sincere kondolencas.- Funebre ni devas raporti, ke f-ino Leono J a c o b ak=cidentis per biciklo kaj mortis la 18.8. La grupo bedaŭ=ras je ŝia persono la perdon de fervora s-anino. Bauer.

INSTRUA SEKCIO

Baze de klopodoj de la I.S. la eldonejo Waldheim-Eberle (Viano 7., Seidengasse 3-11) baldaŭ presigos la fabelon "Fingrulino" (de Andersen), tradukitan de prof. d-ro S i r k . La bildoj estas ĉiupage multkolore fari=taj. Kvankam la libreto estas destinita por infanoj, ta=men ĝi ankaŭ ĝojigos ĉiujn kursanojn kaj povos esti an=kaŭ uzata en la familio kiel legaĵo. La prezo de la bele bindita libreto en maoportuna formato estos modesta (6 - 7 S). Antaŭmendu ĝin urĝe ĉe la mencilita eldonejo, por ke tiu ĉi povu tuj realigi la presadon!!! Per tio vi akcelos nian ĝutan movadon.

Ĉiuj geinstruistoj kaj geinstruantoj estas denove petataj, aliĝi al nia Instruista Sekcio kaj kunlabori en ĝi!

NATURAMIKA FAKGRUPO

La Naturamikaj Esperantistoj surprizis la E-istan publikon per la unua n-ro de sia "oficiala ligilo", la belpresita, revuaspekta, bildohava organo "LA MIGRANTO"! Jen koran gratulon al vi, amikoj, kaj prosperan eldonad=on!La gazeto enhavas ĉefe interesajn artikolojn kaj kro=

me organizaĵojn, sed eĉ ankaŭ kanton kun belaj klisigitaj muziknotoj. "Ekmigru, Migranto!" Jen la gaja deziro de d-ro Siegfried Ziegler, prezidanto de Germana E-Asocio, al kiu certe aligos ĉiu E-ista naturamanto, kiu renkontos ĝin. La organo, 16paĝa, supozeble aperas duonjare, kostas laŭ indiko 1 1/2 resp. kup., kaj estas mendebla ĉe k-do Max Finkenzeller, Grünbergstr. 3/14, Vieno XII.

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

La JARKUNVENO de AKLE Vieno okazis la 12.6.51 sub prezido de prez.ministeria konsilanto d-ro M. Führing kaj en ĉeesto de ĝia pastra konsilanto, pastro komandoro P.G. Plank. AEF-afergvidanto R. Cech salutis kaj parolis nome de AEF. Detalan agraporton prezentis sekretario kaj afer = gvidanto W. Mudrak, kasraporton s-ino H. Kaes. Meznombra vizito de la ligkunvenoj: 20 ges-anoj. Membraro kun ak= celantoj = 50. La kunvenintoj esprimis sindonemon kaj dankon al ĉefepiskopo kardinalo d-ro Th. Innitzer, al komandoro P. Plank, s-ano Gasperini, plue al katolika ga= zetaro - precipe al "Wr. Kirchenblatt" kaj "Kalasantiner Blätter" - kaj same al AERevuo.

La NOVELEKTOJ rezultigis jenan estraron: prezidan= toj d-ro Führing, d-ro Görlich; afergv. kaj sekr. W. Mu= drak; kasistinoj s-inoj Kaes kaj Wildner; pluaj estrar= anoj s-ino d-rino Flasch, Crignis, Scherpon, Schreiber, Winkelhofer, Zdura kaj Mudrak, s-roj Huber, Kainz, Ryba kaj d-ro Wild; kontrolantoj s-ino Wiesinger, s-ro Pajtler.

La DI-SERVO dum la 5a AE-Kongreso en Innsbruck vere inde okazis. La S.Meso, celebrita de P. Rosner, abatejano de Wilten, estis dediĉita al la animo de la mortinta kara edzino de s-ano Hans Steiner. Pri la signifo de E. laŭ vidpunkto de kristana amo predikis kaplano L. Thalmaier, gasto el Germanio. Specialan dankon al la fervora fratino M. Alocoque kaj ĉiuj aliaj kunhelpintoj. - Raporton pri la XXIIIa Internacia Kongreso de Katolikaj E-istoj ente= nos la venanta n-ro de AER.

La XXIIIa Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj okazis en kadro de la 36a UEK en München. Ĉe inaŭgura Di servo en Ludwig-preĝejo (vespera meso kun E-prediko de prof. Beckers, Belglando) prelegis kaplano Thalmaier, la sukcesa organizinto de la IKKE, la specialan salutleteron de nia ĉefepiskopo kard. d-ro Innitzer germane kaj Espe=

rante. Dum la Solena Malfermo oni aŭdis signifajn salut=leterojn de pluaj 13 episkopoj. Dum tuttaga ekskurso al Freising, la malnova episkopa urbo, oni festis s. meson kun prediko de kapl. Thalmaier ĉe la altaro de Sta Korbiniano (paca batalinto antaŭ 1200 jaroj) en la kripto de la fama, unike artplena katedralo. Reveture oni haltis en Dachau, memorante en la dolorpensigaj lokoj la sennombrajn viktimojn (inter kiuj estis pli ol 2000 katolikaj pastroj el diversaj landoj). Kongrestemoj estis jenaj: "Problemoj de elmigrado" (IKUE-gen. sekr. de Jong) kaj "Ĉu la historio havas sencon?" (prof. Mielert). Dum aparta Diservo en Gregorianum anstataŭ bedaŭrinde pro mlsano ne veninta kara pastro Carolfi predikis kaplano Thalmaier. Ĉiuj kantis la meson de Haydn "Jen klinas sin al vi, ho Di!". Dum la Ĝenerala Kunveno de IKUE oni akceptis novajn statutojn. Oni elektis prezidanto ree prof. A. Beckers kaj ĝen. sekr. de Jong. 1952 ne okazos kongreso de IKUE. La kongreson partoprenis 150 anoj el 12 landoj, inter ili 18 pastroj, sed ĉeestis, precipe la Diservojn, ankaŭ aliaj ges-anoj diverslandaj. W. M.

Nia samideano d-ro A. H a l b e d l en Knittelfeld verkis ilustritan biografion de Pio X, la papo, kiu jam 1906 ekkonis kaj vigle aprobis nian Esperanton. La libro titoliĝas "Papo Pio X. beata", estas eldonita de nia oferema s-ano Antonio P a o l e t en S. Vito al Tagliamento, Itallando, ampleksas 111 paĝojn kaj kostas 500 lirojn; ĝi estu eldonita okaze de la solena proklamo de la beatuleco la 3.6.51, sed bedaŭrinde la presisto ne pretigis ĝin ĝis tiam.

La E-movado de la ĉefdioceso de Salzburg/urbo eldonas Mitteilungsblatt, kiu, laŭ la tre impona artikolo de s-ano Domchorvikar Josef Kaps, plenumu la taskon, en germana kaj Esperanta lingvoj kontinuigi la kontakton inter la Rompilgrimintoj de la dioceso. Ĝi okupu sin pri Romo kaj la pilgrimadoj kaj pri la el ili rezultantaj ideoj kaj aliparte kontaktu kun la ideologio de la E-istoj. La komunikilo aperu minimume trifoje pojare kaj estu liverata je la prezo por 1951 de S 3.--. Turnu vin al "Esperanto-Bewegung der Erzdiözese Salzburg, Salzburg, Kapitelplatz 2-I.

J u n u l o j, s k o l t o j ! Pro manko de tempo ne plu longe povonte plenumi la taskon de nacia agento de SKOLTA ESPERANTISTA LIGO, mi serĉas s-anon, kiu bone praktikas nian lingvon kaj anstataŭu min en la indikita funkcio. Pro pluraj rivalaj skoltaroj tiu nova agento estu laŭeble organize neŭtrala. La funkcio estas tre grava, ĉar ĝi esperantistigu bone edukatajn geknabojn kaj per ili donu al la internacia skoltismo sian nepre necesan mondhelplingvon. La skoltismo ekzistas nun oficiale en 51 landoj. Interesatoj skribu (kun respondafranko!)al d-ro Adolf Halbedl, Knittelfeld, Schmittstr.17.-Skoltoj, aliĝu al "SEL", jarkotizo 20.-- S kun la bela, ilustrita instrua organo"LA SKOLTA MONDO",kies unuopaj ekzemploroj estas ankaŭ riceveblaj ĉe mi per S 2.--. Informoj kontraŭ resp.afranko.Konkuru pro la insigno de E-tradukisto!

D-ro A. Halbedl.

La 24a kongreso de SAT en Stokholmo 1951

La perfekte organizita kongreso komenciĝis sabate vespere, la 28.7., per Interfratiga Vespero en la rondsalono de la Vintra Palaco. Muziko kaj poezio enkadrigis tiun ĉi unuan kontaktiĝon inter malnovaj konatoj kaj novuloj. La malferman solenon en la Civitana Domo,indikita per ruĝaj kaj verdstelaj standardoj sur altaj stangoj, ĉeestis pli ol 700 personoj. Entute la kongreson partoprenis 584 gek-doj el 12 landoj(aliĝis 680 el 15 landoj). Dum la malfermo parolis reprezentantoj de sindikatoj, socialista junularo, laboristaj abstinenculoj kaj salutis landaj delegitoj.

La gvidrezolucio de la kongreso enhavas la deziresprimon, ke la asociaj instancoj daŭrigu sian laboron laŭ samaj principoj. Pro la militpsikozo, kaŭzita de la ĉiuflanka rearmado, la kongreso apelacias al la tutmonda organizita laboristaro, kunagadi por malebligi novan militon. La kongreso opinias aktuale, ke, senkonsidere al politikaj diferencoj,la sindikataj mondorganizoj celu efikan kunlaboron por energie malhelpi la ekspoldon de nova mondkatastrofo.

La diverslandaj kamaradoj koncize raportis pri la ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj en siaj teritorioj

kaj prelegoj zorgis pri la kleriga flanko de la kongreso. F. Szilagyi oratoris pri evoluo de la literaturo en Svedio, F. Faulhaber pri agado kaj rolo de Literatura Komitato kaj N. Bartelmes referis pri fluoj kaj refluoj en la historio de SAT. Krome OKK prezentis tri kulturfilmojn enkadrigitajn de pianomuziko de Viena blinda esperantisto. Fakaj kaj frakciaj kunvenoj montris sufiĉe grandan nombron da partoprenantoj kaj akceptis por sia venanta agado precizajn laborprogramojn. La tuta Stokholma gazetaro tre bone kaj objektive raportis kun intervjuoj kaj fotoj pri la kongreso. Debato pri la rolo de la sindikataro en la batalo por la paco (5.8.) vekis pasian diskutadon, ĉar ne ĉiuj interkonsentis pri la rimedoj uzendaj. La adiaŭa vespero unuigis ankoraŭfoje ĉiujn por finfesto kaj la programon improvizis bonsukcese diversnaciaj kongresanoj. (Ekstrakto el la oficiala raporto.)

*** "EL POPOLA ĈINIO" estas la titolo de monata E-gazeto, kiu aperas en la nova Ĉinio. Grandformata, 8paĝa, kun fotoj, lignogravuraĵoj kaj desegnoj, ĝi raportas en bonega lingvo pri kultura, politika kaj ekonomia konstruado en tiu ĉi lando. A b o n u la revuon kaj se ĝi estas tro multekosta por vi, abonu ĝin duope kaj rekomendu ĝin al via E-grupo! 1 ekzemplero kostas inkluzive alsendon S 1.70 aŭ 1 int. resp. kupono. M e n d u ĉ e : Franz Haiderer, Vieno X., Friedrich Knauerg. 2/1/1/6 ! ***

La INAUGURON DE LA PANTEONO DE LA ESPERANTO-MONDMOVADO ĉeestis amaso da Vienaj kaj ekster-Vienaj ges-anoj. Inter la eminentaj gastoj, kiuj honoris la aranĝon, ni nur citas s-anon Hans JAKOB, reprezentinton de UEA, kaj federacian prezidinton Wilhelm MIKLAS, kiuj digne alparolis la festanojn. Dum sia festparolado s-ano kortega konsilanto Hugo S t e i n e r skizis la ekeston kaj la evoluadon de la Internacia E-Muzeo, kiu, fine, kondukis al la kreo de la Panteono. Per ĝi , laŭ la vortoj de generalo BASTIEN, la m u z e o n u n h a v a s a n i m o n . Ĝi, kiel diris federacia prezidinto Miklas, estu p a c a d m o n o al ĉiuj homoj, kiuj, en senco de la anĝelmesaĝo de Betlehem, havas bonan volon!

VIENA ESPERANTO-TAGO 1951

Sabate, la 6.10., en la bela kinosalono de General=postdirektion kolektis sin okdeko da Vienaj ges-anoj, kiuj aŭskultis,post enkondukaj vortoj de afergvidanto de VED, s-ano Cech, la raportojn pri la nunjara AK-Kongreso (Vokal), la 36ŭa UEKongreso en München (Finkenzeller),la 23a Katolika E-Kongreso samtie (Mudrak), la 24a SAT-Kon=greso, Stokholmo, (laŭ oficiala raporto de SAT, Manjo Ohrenberger) kaj pri la 2a vojaĝo de la Aŭstria E-Turis=ma Servo al Nederlando (Gustav Loibel).Kiel lasta rapor=tanto parolis s-ano Janecka,reprezentanto de ILEPTO por Aŭstrio, pri sia partopreno al la 3a IFEF (fervojista) - Kongreso en Parizo.

Aldone estis prezentataj du kulturfilmoj de la aŭst ria poŝto: "Radio kaj sporto" kaj "Vojaĝo per poŝtaŭto=buso al Groszglockner".

Dimanĉe, la 7.10., oni kunvenis en la poŝtdirekcia festsalono por festi la 5an datrevenon de la fondo de la "E-unuiĝo de aŭstriaj poŝt- kaj telegrafistoj". El la gravaj personoj, kiuj bonvolis alparoli la festantojn,ni citu speciale ministerian konsilanton d-ron Engelmann, kiu transdonis al s-ano Janecka la E-dekoracian insignon.Gran=dan impreson faris la parolado de Bundesrat H o l z = f e i n d , estro de la poŝtista sindikato, kiu ripetis la intereson kaj simpation de la sindikato al E.kaj pro=mesis pluan subtenon por la agado de la fakgrupo.

Pri fakgrupaj aferoj referis ges-anoj Riedl ka D@=nisch. Notinda estas ankaŭ referaĵo de s-ano Maier pri E. kaj la mondlingva problemo. Registara konsilanto Ber=ger parolis nome de la fakkolegoj.

En la dua parto kortega konsilanto Steiner donis informojn pri la Internacia E-Muzeo. Magistro Höfert sa=lutis nome de UEA kaj s-anoj Vokal kaj Finkenzeller - ĉi foje germanlingve - parolis pri la Innsbruck-a kaj Mun=kena kongresoj. Same s-ano Mudrak pri la katolika E-kon=greso.Ges-anoj Sinner kaj Ziwutschka donis sugestojn por la agado en la poŝta medio kaj, fine, s-ano Gschanes in=formis pri la aktivado de la Instruista E-Sekcio. Mal=granda, sed interes ekspozicio pri E-propagandiloj kaj libroj fermis la kunvenon.

Posttagmeze renkontiĝis pm. 50 ges-anoj en Schönbrunn kaj pasigis en la salono de Tivolo-restoracio kelkajn agrablajn, amikajn horojn.

(Resumo el raporto de s-ano Cech.)

* * * * *

La sprita advokato.

de Alois Norbert.

Oni ne povas postuli, ke hundo de advokato sciu same bone la laĝojn kiel sia sinjoro. Kaj do povas okazi, ke ankaŭ la hundo de advokato kaptas la malpermesitajn kolbasojn de buĉisto kaj forkuras kun sia rabaĵo.

Sed la buĉisto, kiu observis la rabon, estis saĝa viro kaj li volis procedi kun speciala ruzo. Li do iris al la advokato kaj demandis lin ĝentile: "Se hundo ŝtelas de mi kolbason, kiu do devas kompensi la kolbason?"

La advokato, kiu ne sciis, kio okazis, diris same ĝentile kaj sincere:"Kompreneble la posedanto de la hundo."

"Bone do, sinjoro advokato", diris la buĉisto ridante, "mi petas, pagu al mi kvin ŝilingojn, ĉar via hundo hodiaŭ matene kaŭzis al mi la menciitan domaĝon!"

"Vi estas prava," diris la advokato kun same bona humoro, "vi do postulas kvin ŝilingojn pro la kolbaso. Sed mi postulas dek ŝilingojn pro la jurista informo, kiun mi ĵus donis al vi."

* * * * *

R E C E N S O

Leitfaden der Esperantosprache de Harry Königstadt. Eldonejo Hugo Mayer, Dornbirn, Aŭstrio; poŝformato, broŝura 64 paĝoj, aŭstr. ŝil. 4.50.

Tiu nova lernlibreto prezentas sur 43 paĝoj en 10 lecionetoj la strukturon de la lingvo Esperanto laŭ la konata gramatika metodo. En "aldono" sekvas "ŝlosilo" (traduko de la lecionaj tekstoj kaj taskoj), frazareto,

listo de la afiksoj kaj la plej gravaj adresoj de la E-movado. La preso estas klara, la frazoj simplaj, la klarigoj tre, eble tro koncizaj. Por memlernado la ekzemploj kaj la vort materialo n e sufiĉas, nur kune kun la "Fundamenta Krestomatio" aŭ alia bona legaĵaro ili povas servi al diligentaj lernemuloj. Sed por kursoj la libreto povas esti helpa bazo kaj la enestanta instigo al tuja interkontaktiĝo kun eksterlandaj E-istoj estas bona reklamo. - Entute, la eldono de tiu nova E-lernlibro per nova eldonejo en nia ekonomie kaj kultura malfacila tempo estas salutinda. Tial ni deziras al la aŭtoro kaj eldonisto kiel eble plej vastan sukceson.

E. Werner.

* * *

Aŭstria Esperanto-propagand-fonduso

A.E.F.-estraro danke kvitancas la ricevon de pluaj kontribuaĵoj de la s-anoj S a k l S 10.--, H ö f e r t S 20.-, C e c h S 5.--, J a n e c k a S 10.-- kaj S i n n e r S 2.--.

Malnova sumo: S 460.--
plus: 47.--

Nova sumo: S 507.--

Pluaj libervolaj donacoj estas pro intencata eldono de nova propagandilo urge necesaj kaj de vi, ŝatataj gesamideanoj, petataj.

* * *

Soneto: LA RIFO EL KORALO

Mistera matenigˆ' la suno sub la maro
heligas la densajˆon de koral' profunda,
miksante al varmeto de basen' senfunda
la beston malfermitan kun la viv-floraro.

Kaj ˆcio kion kolorigas jodo, salo;
ekinoj, anemonoj, musko, alg' ribela,
laŭ ricaj bildoj kovras per prupur' malhela,
la strian fundon de la madrepora palo.

Per sia brila skvam', emajlojn estingante,
fiŝego kiel ŝip' tra brancoj veturante,
malvigle vagas en malhelon travidotan.

Kaj per subita bato de la fajr' naĝila,
ĝi tra kristalo blua kun malgoj' trankvila,
kurigas tremon oran, verdan, perlamotan.

J. M. de Heredia (1842-1905)
El la franca lingvo tradukis Lucien Thévenin.
(El "Franca Esperantisto")

* * *

Herausgeber, Verleger und Herausgeber: Oesterreichischer Esperantistenverband Wien I., Neutorgasse 9.
Für den Inhalt verantwortlich: Hugo Kraus, Wien I., Neutorgasse 9.
Druck: Hans Likan, Wien 6., Mollardgasse 85a.